

Por « La SAGO », organo de SATamikaro

Temo : uzo de afiksoj, mirakla solvo

-ino, -ido, -ejo

Cu tro simpla solvo aŭ tre bela formo ?

Specio : ĉevalo

Vira individuo : virĉevalo

Ina individuo : ĉevalino

Beba, junaĝa individuo : ĉevalido

Loko por kelkaj individuoj de tiu specio : ĉevalejo

Mirinde simpla kaj praktika solvo, ĉu ne ?

Franclingvanoj konas

Espèce : cheval

Etalon – jument – poulain – écurie

Homoj, kiuj lernas la francan lingvon, devas lerni tiujn 5 vortojn.

Mi studis la germanan, mi devis lerni 5 vortojn :

Pferd por la specio, kaj poste Hengst, Stute, Fohlen, Stall

... mi ŝvitis...eĉ sen rajdado...

Dum trajnveturado al Dole, Francio, por prelegi pri Esperanto en majo 2013, venis al mia menso jena komparo :

La franca lingvo, kaj ĉiuj aliaj etnaj lingvoj, estas mirinde belaj, same admirindaj, riĉaj kaj abundaj kiel la verkoj de la aŭstra arkitekto Hundertwasser.

Nia lingvo Esperanto estas mirinde efika, travidebla, kun kaptebla strukturo kiel la verkoj de la svisa arkitekto Le Corbusier (kiu naskiĝis en 1887 en La Chaux-de-Fonds kaj poste fariĝis franco).

Mireille Grosjean

Naskita en La Chaux-de-Fonds

Svislando